

LA ARBARO DE ANYKŠČIAI

Nudaj montetoj kaj valoj senarbaj!
Ĉu iu kredas, ke vi estis ĉarmaj?
Kie pereis beleco estinta
Kun trankviliga muĝad' arbopinta,
Kiam susuris folia tegmento
Kaj ŝanceliĝis pinegoj pro vento?
Kien forflugis birdetoj-pepantoj,
Kiuj la koron ĝojigis per kantoj?
Kie nun viaj bestetoj kaj bestoj
Kun la kavernoj, kuŝejoj kaj nestoj?
Ĉio pereis: la kampo malplenas,
Kelkaj nur kurbaj pinetoj sin tenas...
Kuŝas branĉetoj, tapiŝo strobila
Kaj sunrostiĝas teren' senutila,
Kiun rigardas okulo malseka:
Kvazaŭ forbrulis palaco belega,
Kvazaŭ ruinoj de urbo amata,
Kvazaŭ enua dezerto malsata.
Estis tempo – kun ĝojo arbaren vi iris,
Gajis via animo, okuloj admiris,
Kaj demandis vi ofte kun vera surprizo:
En arbaro mi staras ĉu en paradizo?
Kien ajn vi rigardis – verdaĵo kaj floroj!
Kien flaris vi – tiklas la nazon odoroj!
Kien ajn vi aŭskultis – sonor', ĉio bruas!
Kaj vi sentis – trankvilon la koro jam ĝuas!
Jen tapiŝo el musko moleta invite
Logas kapon ripozi kaj vibras tuŝite.
Kvazaŭ rutoj terenon berujoj inundas,
Beroj ruĝaj kaj nigraj alloge abundas,
Kaj sur fono grizverda punktetoj de fungoj
Ĉie buntas jen inter arbustoj kaj trunkoj.
Kantareloj funele en ombra krepusko
Iuloke honteme elstaras el musko.
Laktofungoj similas al etaj teleroj
Dismetitaj amike sur teraj tuberoj –
Multaj specoj da ili en aroj kunsidas.
Trikolomoj sin kaŝas en herbo kaj ridas.
Jen rusuloj kun blua aŭ roza koloro
Gaje kreskas sur placo sen zorgo, doloro.

Ĵesperanto kalbą vertė **Petras Čeliasukas**